

# Esperanto-Brno

*Esperanto-Brno - Kluba prelego 5.6.2013*

## **Alberto Vojtěch Frič**

*Oldřich Arnošt Fischer*

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, la 5-an de junio 2013

Alberto Vojtěch Frič [vojteĥ friĉ] estis ĉeĥa etnografo, vojaĝisto, botanikisto, fotisto kaj verkisto.

Li naskiĝis en familio de juristo kaj Praga vica ĉefurbestro Vojtěch Frič la 8-an de septembro 1882. Lia patrino Růžena Fričová, fraŭlinnome Ŝvagrovská, devenis el ĉeĥa patriota familio el Roudnice. Du liaj onkloj, Max Ŝvagrovský kaj Josef Václav Fri

, batalis por libereco de slavaj nacioj kaj post konfliktoj kun aŭstro-hungara monarĥia reĝimo ambaŭ devis elmigri eksterlanden. Lia nevo Martin (Mac) Frič (1902-1968) fariĝis fama ĉeĥa filma reĝisoro.

Kiel eta knabo Frič alportis hejmen kaktan *Echinopsis eyresii*. La kakti ekfloris kaj ligis al si atenton de la knabo, antaŭ kiu tiel nova mondo malfermiĝis. Jam 15-jara knabo Vojtěch estis konsiderata unu el la plej grandaj spertuloj pri kakti en centra Eŭropo kaj ricevadis petojn pri konsultoj kaj invitojn al sciencaj konferencoj.

Li ankaŭ kolektis kakti, sed en la jaro 1899 vintre ĉiuj liaj kakti mortis pro frostiĝo. Frič ne rezignis kaj decidis kolekti novajn kakti. En la jaroj 1901-1929 li entreprenis 7 vojaĝojn al Suda Ameriko kaj unu al Norda Ameriko, kie li kolektis ne nur kakti, sed ankaŭ etnografiajn materialojn pri sovaĝe vivantaj indianoj, ofte el nekonataj regionoj. Sudamerikaj indianoj donis al li nomon Karaí Pukú (Altstatura ĉasisto). Kakti li serĉis de Mato Grosso trans Gran Chaco ĝis por krutaj deklivoj de Andoj en alto pli ol 5000 m supermare kaj publikigis fotojn de multaj pejzaĝoj surkreskitaj de kakti, kiujn li tiamaniere popularigis.

### **La unua vojaĝo – 1901 – 1902**

#### **Suda Ameriko – São Paulo, basenoj de la riveroj Tieté, Verde kaj Verdão**

Tiun vojaĝon parte financis patro de Frič esperinte, ke lia filo timiĝos de granda mondo kaj neniam plu volos vojaĝi. Vane, ĉar Frič fariĝis profesia vojaĝisto. La unua vojaĝo kondukis Frič-on al sovaĝaj anguloj de praarbo Mato Grosso, kie li renkontis indianojn de la gento Ŝavanto. Li devis reveni pli frue ol planite, ĉar li estis grave vundita de jaguaro. La rabobesto lin surprizis, li sukcesis vundi ĝin per pafado, sed la du korpoj kunfrapiĝis. Li fine mortigis la beston per ponardo, sed ankaŭ liaj vundoj lin preskaŭ senvivigis, se la indianoj ne

kuracus lin dum pluraj semajnoj. Li fariĝis viro, kiu mortigis la jagaron kaj transvivis ĝian ĉirkaŭbrakon. Tio akiris al li grandan respekton ĉe la indianoj. Li devis reveni en Eŭropon, sed la preskaŭ pia respekto al lia persono poste ebligis al li atingi celojn, kiuj estus alie nerealigeblaj.

Post reveno Friĉ aranĝis ekspozicion de kolektaĵoj en praga komercdomo „U Nováků“ („Ĉe Novakoj“) en la strato Vodičkova en Prago. Li prezentis tie tropikajn skarabojn, papiliojn, plantajn semojn, kanon, manihoton, tabakon, serpentajn kaj lacertajn ledojn, testudajn ovojn kaj multe da fotojn. Li volis amikiĝi kun pli aĝa kaj sperta ĉeĥa vojaĝisto Enrique Stanko Vráz (1860-1932), sed sensukcese.

## **La dua vojaĝo – 1903 – 1905**

### **Suda Ameriko – Urugvajo, Paragvajo**

Subgvide Václav Körber estis fondita Rondeto de Kaktistoj (Kroužek pěstitelů kaktusů) en Prago la 18-an de junio 1903. Rondetanoj aprezis laboron de Friĉ, vizitadis lian kolektaĵon de kakttoj en vilao Božínka kaj interesiĝis pri novaj kakttoj.

Friĉ bone sciis, ke vivmedio de indianoj estas detruata per blankuloj. Li volis helpi al indianoj kaj doni ateston pri ilia malaperanta vivmedio. Dum sia dua vojaĝo Friĉ esploris por la paragvaja registaro la fluon de la rivero Pilkomaĵo. Li malkovris tombon de la hispana geodeto Ibarreta (+ 1898) kaj konstatis, ke indianoj mortigis lin en kverelo, kiun li senprudente provokis. Friĉ restis certan tempon ĉe la tribo Ĉamakoko en la regiono de la rivero Paragvajo kaj edziĝis tie al indianino *Lora-y* (Nigra Anasino), kiu naskis al li filinon Hermína (verŝajne en septembro 1905). Tiujare li forveturis hejmen kaj neniam plu renkontiĝis kun ili.

## **La tria vojaĝo – 1906 – 1908**

### **Suda Ameriko – Brazilo, Argentino, Paragvajo**

Apud brazila haveno San Antonio Friĉ arĥeologe esploris amasojn da ŝeloj, en kiuj trovis ankaŭ homajn skeletojn kaj ostojn, restaĵojn de kanibalaj festenoj de pratempaj indianoj.

Amikoj de Friĉ, indianoj de la tribo Ĉamakoko, malsaniĝis per nekonata, sed grava malsano. Li kapablis nek labori nek ĉasi. Friĉ vane trovis kaŭzanton de la malsano, eĉ kuracisto en paragvaja ĉefurbo Asunción ne kapablis helpi. Tial Friĉ kunprenis al Pragon indianon el la tribo Ĉamakoko, pri kies restado en Prago (1908-1909) verkisto Jaroslav Hašek (1883-1923) verkis rakonton *Indiano kaj la praga polico* (*Indián a pražská policie*). Juna indiano Ĉervuiŝ Pinoŝad Mendoza, kiu ricevis ĉeĥan kromnomon Ĉervíček (Vermeto), estis ŝokita per eŭropa vivstilo de secesa Prago. Friĉ uzadis lin kiel demonstran helpilon ĉe prelegoj, sed la vera motivo estis, ke Ĉervuiŝ suferis misteran malsanon ekstermanta lian tribon. En Bohemio la kuracado sukcesis.

La malsano, kiu atakis la indianojn, estis parazita malsano, kies kaŭzanto estis parazita vermo *Ancylostoma duodenale* Dubini, 1843, kiu apartenas al la familio Ancylostomatidae. Adultaj vermoj parazitigas en maldika intesto de homo. Gastiganto povas esti ankaŭ kato, hundo kaj simio. Femaloj en intesto metas ovetojn, kiuj estas ellasitaj per fekaĵoj. Se temperaturo estas pli granda ol 21 °C, el ovetoj baldaŭ elkoviĝas larvoj de la unua stadio (L<sub>1</sub>). Tiuj larvoj kaj larvoj de la dua stadio (L<sub>2</sub>) ne estas danĝeraj, ĉar ne kapablas infektigi gastiganton. Post la dua transhaŭtigado estiĝas larvo de la tria stadio (L<sub>3</sub>), kiu estas danĝera, ĉar ĝi aktive serĉas gastiganton kaj penetras lian haŭton. La indianoj ofte ne portas ŝuojn, kaj tial L<sub>3</sub> facile penetras haŭton de piedoj. En loko de enkorpigado de L<sub>3</sub> estiĝas ulceroj.

La  $L_3$  migras trans korpo en pulmon, kie kaŭzas inflamojn. Se estas eltusita, kun muko estas englutita, migras trans stomako en maldikan inteston, kie maturiĝas. Vermoj, kiuj mezuras eĉ 18 mm, en la maldika intesto kaŭzas inflamojn de intesta mukozo. Suĉado de sango rezultas en anemion, eĉ morton. Kiel kuracilo tiam servis forta laksigilo. Nuntempe oni uzadas modernajn kuracilojn, sed ankilostomoza malsano de malriĉaj homoj, kiuj vivas en malbonaj higienaj kondiĉoj. Tiun malsanon ni scias ankaŭ en Eŭropo kiel malsano de ministoj kaj konstruistoj de tuneloj de la 19-a jarcento („tunelista malsano“ de laboristoj en subalpaj tuneloj), ĉar en minoj kaj tuneloj estas varma kaj humida mikroklimato. Prevento estas higieno kaj portado de bonaj ŝuoj.

### **La kvara vojaĝo – 1909 – 1912**

#### **Suda Ameriko – Paragvajo, Argentino**

Friĉ kun resanigita amiko Ĉervuiŝ revenis en Paragvajon; apud fortikaĵo Bahía Negra Friĉ kuracigis tutan tribon de Ĉamakokoj kaj ankaŭ indianajn hundojn. Revenante li partoprenis en la 18-a Kongreso de Amerikanistoj en Londono (1912). Tiam li estis grave malsana suferante de malario. Tial li devis nek servi en aŭstro-hungara armeo nek batali en la unua mondmilito. En la jaro 1919 li partoprenis en politikan batalon en nova respubliko, Ĉeĥoslovakio. Li publikigis politikajn afiŝojn kaj libron de rakontoj „Cihly“ („Brikoj“), kiun dediĉis al honoro de sia patro kaj amantino Ludmila Dadáková, kiuj mortis en la jaro 1918. En libro „Cihly“ li kritikis bolŝevikojn skribinte, ke vortoj de Lenin kaj Trocki pri libereco estas nur bolŝevika trompo kontraŭ tuta mondo (ĉapitro „Bolŝevismus/Bolŝevismo“).

### **La kvina vojaĝo – 1919 – 1920**

#### **Suda Ameriko – Urugvajo, Argentino**

En 1919 Friĉ vojaĝis ne nur kiel vojaĝisto kaj sciencisto, sed ankaŭ kiel oficiala sendinto de ĉeĥoslovaka registaro. Tiam ministro de eksteraj aferoj, dr-o Edvard Beneš<sup>(1)</sup>, proponis lin eĉ kiel ambasadoro en Brazilo, sed fine la propono ne realiĝis. Laboro de diplomato ne logis vojaĝiston. Dum la kvina vojaĝo Friĉ trovis multe da novaj specioj de kakttoj. Post reveno li kritikis malbonan politikon de ĉeĥoslovaka registraro. En vilao Božínska kunvenis botanikistoj, aktoroj, pentristoj, verkistoj, esploristoj kaj nesukcesaj politikistoj. Verkisto Karel Čapek (1890-1938), kiu verŝajne vizitadis Božínskan, en sia fama rakonto „Ŝtelita kaktto“ („Ŝtelita kaktto“) uzis valorajn sciencajn nomojn de kakttoj kaj menciis ankaŭ nomon de Friĉ.

Friĉ en Prago edziĝis kaj ŝia edzino Draga donis al li filon nome Ivan (1922).

La 8-an de oktobro 1922 estis fondita Societo de Kaktistoj en Ĉeĥoslovaka Respubliko (Spolek pěstitelů kaktusů v ČSR)<sup>(2)</sup>, kies honora prezidanto fariĝis A.V. Friĉ.

---

1( ) Dr-o Edvard Beneš (1884-1948), la 2-a ĉeĥoslovaka prezidento en la jaroj 1935-1938 kaj 1945-1948.

2( ) Nuntempe tio estas Spolek pěstitelů kaktusů a sukulentů (Societo de Kaktistoj kaj Sukulentaj plantoj), [www.spks.cz](http://www.spks.cz).

## **La sesa vojaĝo – 1923 – 1924**

### **Centra kaj Norda Amerikoj – Usono, Meksiko**

Friĉ bezonis komercajn kontaktojn en Germanio, tial li vizitis Dresdenon kaj Berlinon. En Usono ekkonis Novjorkon, Vaŝingtonon, Teksason (El Paso), sed la plej gravaj estis kolektadon de kaktaj en Meksiko. En tiu lando li ekkonis tribon Tarahumara kaj interesiĝis pri kuracaj kaj narkotaj efikoj de kaktaj. Li ne estis kuracisto, sed dum siaj vojaĝoj li ofte kuracis homojn kaj sin mem. Li faris eksperimentojn kun narkotaj kaktaj uzante sin mem kiel eksperimentkuniklon.

El Meksiko li sendis hejmen 54 kestojn kun 30 000 da plantoj, sed tiuj plantoj frostmortigis en doganejo en Podmokly (en Bohemio). Grandajn problemojn faris al Friĉ ankaŭ intrikoj de komercaj konkurantoj.

## **La sepa vojaĝo – januaro – junio 1927**

### **Suda Ameriko – Brazilo, Urugvajo, Argentino, Paragvajo**

Kolektadoj de kaktaj en Brazilo kaj Urugvajo estis nesukcesaj. En Argentino Friĉ trovis interesajn montarajn kaktajn. Ankaŭ kolektado en Paragvajo estis sukcesa.

## **La oka vojaĝo – 1928 – 1929**

### **Suda Ameriko – Urugvajo, Argentino, Bolivio? Peruo?**

En Urugvajo Friĉ kolektis kaktajn en montaro Sierra de las Animas kaj en Argentino en montetaro Andoj.

## **Post reveno**

Friĉ en Prago kontinuas sian scian laboron kun kaktaj. Kaktista movado tiam estis splitigita kaj tial Friĉ ne volis partopreni en neutilaj kvoreloj de diskordaj kaktistoj kaj ĉesis kontaktojn kun tiuj institucioj. Sed neoficiale li faris komplezojn kaj helpis al ĉiuj homoj, kiuj interesiĝis pri kaktaj.

Li proponis novan scian sistematikon de kaktaj. Krom tio li interesiĝis pri plantoj, kiuj donas kaŭĉukon, kaj sojo. En Bohemio li estis respektata nur kiel kaktisto, sed ne kiel etnografo. Li publikigis multe da fakartikoloj en fremdaj lingvoj, liaj etnografaj kolektaĵoj estis metitaj en muzeoj de Novjorko, Sankt-Peterburgo kaj aliaj urboj de la mondo.

Bedaŭrinde en sia lando li ne estis bone akceptita. Oni akceptis lin nur kiel kaktisto, sed ne kiel etnografo. Friĉ vivis kiel unu de indianoj kaj aktive sciis 36 indianajn lingvojn. Liaj instruistoj ofte estis indianaj infanoj, kun kiuj li ŝatis babiladi. Li kompilis vortarojn de kelkaj indianaj lingvoj, sed hejme oni ne respektis lin.

## **En ombro de svastiko**

Alberto Vojtĉ Friĉ havis komercajn kaj sciencajn kontaktojn en Germanio. Li flue parolis germane. Sed li ne konsentis kun nazia rasismo, kiu rezultis al persekvado kaj barbara elmortigado de ses milionoj de judoj en Eŭropo dum la dua mondmilito.

Post mortigado de germana antifaŝisto Formis (la 23-an de januaro 1935) per germanaj agentoj Göttisch kaj Naujocks<sup>3)</sup>, du germanaj oficiroj vizitis Friĉon. Ili salutis lin nazimaniere kaj volis trarigardi novajn kaktojn, precipe hibridon, kiu estis nomigita laŭ Adolf Hitler. Ili gratulis al Friĉ, ke li havis ideon nomigi novan kaktojn laŭ Hitler (prononcante nomon de faŝista diktatoro ambaŭ germanoj denove salutis nazimaniere). Sed Friĉ ridetante amike trankvile respondis al ili: „Do, sinjoroj volus rigardi kakton *Rebutia adolf hitler*? Sed tio estas kriplaĉulo. Ĉi tie ĝi estas, rigardu ĝin – ne floras, nur naniĝas neprosperante. Tio ne estas interesa planto kaj verŝajne ĝi baldaŭ mortaĉos. Sed se vi volas rigardi ion valoran, tio estas *Rebutia einsteinii*“<sup>4)</sup>. Rigardu kiel ĝi belege floras prosperante! Tio estas pli bona kakto.“ La oficiroj rapide adiaŭis. Friĉ pli poste eksciis, ke unu de ili estis germana ambasadoro von Gregori kaj la dua Naujocks, unu de du murdistoj de Formis.

Kiam resto de Ĉeĥoslovakio estis okupita (la 15-an de marto 1939), Friĉ ŝanĝis sial vivstilon. Ne eldomiĝis. Kiam germanaj okupantoj ordonis anstataŭi ĉeĥajn subskribojn per germana-ĉeĥaj subskriboj, li skribis en sia vilao bilingvajn subskribojn ZIEGE - KOZA (Kapro), TAUBEN - HOLUBI (Kolomboj) ktp.. Li ekportis barbon promesante razi ĝin nur post eliro de germanaj okupantoj. Li devis gajni monon por hejtado de forcejoj kun kolektaĵoj de kaktoj, tial li laboris hejme fabrikante keramikon kaj vendis indianaĵojn kaj literaturon pri kaktoj. Multe da valoraj etnografajoj malaperis en privataj kolektaĵoj en la mondo. Dum la jaroj 1939-1940 vintre frostmortiĝis en Božínka 30 000 da grandaj kaktoj kaj miloj da malgrandaj kaktoj. Iliajn lokojn okupis utilcelaj plantoj.

Sojo estas azia varmamanta planto, neprosperanta en bohemia modera klimato. Friĉ tial sukcese aklimatigis sojon. Li faris multe da eksperimentoj kun tomatoj. Li hibridigis tomaton kun terpomo. Nova hibrido donis tomatojn kaj terpomojn. Gravajn eksperimentojn li faris kun kaŭĉukoriĉa planto kok-sagiz el Sovetunio. Sukcese hibridigis tiu planto kun leontodo (*Taraxacum officinale*) kaj ciĥorio (*Cichorium intibus*). Kreis hibridon de pizo, kies legumenoj mezuris 25 cm! Li hibridigis fragon kun frambo, grosujon kun ribo, sabelikon kun brasikrapo kaj pizon kun lenso. Li sukcese protektis terpomon kontraŭ terpomskarabo (*Leptinotarsa decemlineata*). Hibrido de terpomo havis foliojn, kiuj venenigis la skaraboj, sed terpomoj ne estis venenaj. Li eksperimentis kun fungoj, kiuj produktis proteinojn kaj grason el komunuma balaaĵo. Belegan rilaton Friĉ havis al ĉiuj bestoj. Multe da eksperimentoj, inter ili eksperimentoj kontraŭ maljuniĝado faris uzante sin mem.

La nazioj ne forgesis pri incidento el la jaro 1935 kaj gestapanoj gardis Friĉon volonte akuzi lin de io. Gestapanoj en vilao Božínka demandis Friĉon: „Kiel plaĉas al vi nova

---

<sup>3)</sup> Rudolf Formis (1894-1935) estis germana inĝeniero, teĥnikisto, kiu estis malliberigita en koncentrejo en Germanio, ĉar li interrompis sonigadon de parolado de Hitler (1934). Post fuĝo el la koncentrejo Formis elmigris en Ĉeĥoslovakion, kie batalis kontraŭ nazioj kiel membro de Nigra Fronto (Schwarze Front) elsendinte en germanion antifaŝistan propagandon per kaŝa sendostacio. Reinhard Heydrich (1904-1942), ĉefo de nazia Sekureca Servo (Sicherheitdienst, SD), forsendis en Ĉeĥoslovakion du agentojn. Werner Theodor Göttisch (1912-1974) kaj Alfred Helmut Naujocks (1911-1966), la agentoj de SD, trovis Formison en hotelo en Slapy super Moldvo (Slapy nad Vltavou), proksime Prago, kaj la 23-an de januaro 1935 lin pafmortigis. Formis estis entombigita en Slapy.

<sup>4)</sup> Nuntempa nomo de la kakto estas *Cylindrorebutia einsteinii*.

ŝtatordo?“ – Frič respondis: „Ĝi ne plaĉas al mi. Al vi ankaŭ ne plaĉus, se ni, ĉeĥoj, okupigus Berlinon, se ni fermigus viajn universitatojn kaj donus al vi porciumitajn manĝaĵojn ...“

Dum la diskuto unu gestapano ekvidis inter plantoj iun pistoleton. Li subite eksaltis kaj tiun pistoleton celfiksis al Friĉ. Sed tio ne estis vera pistoletto, nur gumatrapo, kiun ĝardenistoj uzadas por rosado de kelkaj plantoj. Hontigita gestapano denove trankvile eksidiĝis. La gestapanoj volis rezultojn de faklaboro de Friĉ: sojon, kaŭĉukon kaj protektado de terpomoj kontraŭ terpomskarabo. Friĉ havis siajn kondiĉojn: malfermado de universitatoj, liberigado de ĉiuj malliberigitaj garantiuloj. Ne, ili ne povis interkonsentiĝi. La gestapanoj tre malamamis Friĉon, sed lasis lin en paco esperinte, ke li iam helpos al ili. Vane; Friĉ neniam kunlaboris kun nazioj.

Krom gumatrapo de la pistoletto Friĉ havis hejme multe da kaŝitaj veraj pistolettoj kaj fusiloj por batalantoj de kontraŭnazia rezista movado. Dank' al kontaktoj en Suda Ameriko li havigis ĥininon kaj aliajn medikamentojn por la ribeluloj.

En novebro de la jaro 1944 Friĉ akcidente vundiĝis per rustiĝinta najlo. Li pansis la vundetnon, sed baldaŭ observis simptomojn de tetanoso. Li volis esti kuracita per kuraro, saga veneno, kiun uzadas indianoj<sup>5)</sup>. Pragaj kuracistoj ne permesis al li uzi tiun venenon. Mortiganta Friĉ ĝis fino de sia vivo priskribis simptomojn de tetanoso kaj siajn impresojn, por ke helpu al venontaj viktimoj de tiu danĝera malsano. Li mortis la 4-an de decembro 1944 en Prago.

Multe da rezultoj de laboro, inter ili multaj nepublikigitaj verkoj, de Friĉ estis perditaj.

Libroj, kiujn li skribis por junularo (Inter indianoj - Mezi indiány, Leĝo de la praarbaro – Zákon pralesa, Altstatura ĉasisto – Dlouhý lovec, Oĉjo indiano – Strýček indián kaj Serpenta insulo – Hadí ostrov), estas tre valoraj, ĉar Friĉ priskribis Amerikon, kiun persone travojaĝis, kaj indianojn, inter kiuj li vivis. La libroj estis ilustritaj de elstara moravia pentristo Zdeněk Burian (1905-1981). Friĉ eĉ proponis al sia amiko Burian komunan ekspedicion en Suda Ameriko post la dua modmilito, sed bedaŭrinde tiun planon jam ne sukcesis plenumi. Ankaŭ verkisto Eduard Štorch (1878-1956) en siaj libroj pri pratempaj homoj estis inspirita per verkaĵo de Friĉ. Granda verkaĵo de Friĉ estas monografio Indianoj de Suda Ameriko (Indiáni Jižní Ameriky) el la jaro 1943.

En la jaro 1972 reĝisoro Otakar Fuka faris filmon La ago Bororo (Akce Bororo) pri eksterteranoj, kapitalistaj agentoj-fiuloj kaj mistera kuracilo el Suda Ameriko, kiun trovis Friĉ, sed tiu filmo ne estis sukcesa<sup>6)</sup>.

Lia nepo Pavel Friĉ kun edzino Yvonna klopodas kreskigi famon pri A.V. Friĉ. Ok infanojn naskis Hermina, sudamerika filino de Friĉ; ŝiaj idoj fiere portas nomon Fric. Kiam Hermina estis malkovrita de ĉeĥaj filmistoj Alice Růžičková kaj Martin Čihák migrantaj laŭ la spuroj de Ĉervuiŝ, ambaŭ familioj eksciis unu pri la alia en 2000.

---

<sup>5)</sup> Itala kuracisto dr-o M. Vella sukcese kuracigis tetanoson per kuraro jam en la jaro 1858.

<sup>6)</sup> Rivero Amazono en tiu socialista filmo estis anstataŭita per brako de la rivero Danubo.

Sed en la filmo ludis tiamaj bonaj ĉeĥoslovakaj aktoroj, ekz. Radovan Lukavský (kiel voĉo de A.V. Friĉ), Božidara Turzonovová (ĉarma eksterteranino), Vlastimil Brodský kaj Otakar Brousek.

Kaktojn oni povas admiri en Brno en Botanika Ĝardeno de la Naturscienca Fakultato de la Universitato de Masaryk kaj trovi utilajn kontaktojn kaj kosilojn pri la kaktoj en Klub kaktusáŝu Astrophytum (Kaktista Klubo Astrophytum), strato Jilová 130/23, CZ-639 00 Brno, [www.astrophytum.cz](http://www.astrophytum.cz) .

### Literaturo


- CRKAL, K. (1983): Lovec kaktusú [A.V. Frič], 1-a eld., Prago, Academia, 432 paĝoj. [Ĉasisto de kaktoj [A.V. Frič], *ĉeĥlingve*.]
- FRIČ, A.V. (1919): Cihly – přírodovědecké studie z dob censury, 1. vyd., Přerov, 61 paĝoj. [Brikoj – natursciencaj studioj el tempo de cenzuro, *ĉeĥlingve*.]
- FRIČ, A.V. (1919): Příteli Machare<sup>(7)</sup>, vystřízlivěte!, politika afiŝo de la serio „Očista“, Prago, A. Dolenský. [Amiko Maĥar, senreviĝu!, *ĉeĥlingve*.]
- FRIČ, A.V. (1919): Odrakouštěme svoje duše!, politika afiŝo de la serio „Očista“, Prago, A. Dolenský. [Ni foraŝtriigu niajn animojn!, *ĉeĥlingve*.]
- FRIČ, A.V. (1985): Dlouhý lovec – dobrodružství u Indiánů Kaďuvejů, 6-a eld., Prago, Olympia, 165 paĝoj. [Altstatura ĉasisto – aventuroj inter indianoj-kadjuveoj, *ĉeĥlingve*.]
- FRIČ, A.V. (1994): Strýček indián, 9-a eld., Prago – Jihlava, Titanic kaj Madagascar, 136 paĝoj. [Oĉjo indiano, *ĉeĥlingve*.]
- FRIČ, A.V. (1995): Hadí ostrov, 6-a eld., Prago – Jihlava, Titanic kaj Madagascar, 152 paĝoj. [Serpenta insulo, *ĉeĥlingve*.]
- FRIČOVÁ, Y. (1993): Červíček aneb Indiánský lovec objevuje Evropu (rememoroj de A.V. Frič), 1-a eld., Prago, Global kaj Titanic, 160 paĝoj. [Vermeto aŭ Indiana ĉasisto malkovras Eŭropon, *ĉeĥlingve*.]
- JIROUŠKOVÁ, L. (1971): Pošatlaso de la mondo. 1-a eld., Prago, Kartografie. 55 paĝoj. [*esperantlingve*.]
- KLEMPERA, J. (1983): Bílý Indián, 1-a eld., Prago, Práce, 112 paĝoj. [Blanka indiano, *ĉeĥlingve*.]
- VOLF, P., HORÁK, P., ČEPIČKA, I., FLEGR, J., LUKEŠ, J., MIKEŠ, L., SVOBODOVÁ, M., VÁVRA, J. & VOTÝPKA, J. (2007): Paraziti a jejich biologie. 1-a eld., Prago, Triton, 318 paĝoj. [Parazitoj kaj ilia vivo, *ĉeĥlingve*.]

---

<sup>7</sup>(<sup>0</sup>) Josef Svatopluk Machar (1864-1942) – poeto kaj politikisto, dum la jaroj 1918-1924 generala inspektoro de ĉeĥoslovaka armeo. En la afiŝo Frič kritikis lian nerealisman optimismon.



## Čeĥa poštmarko dediĉita al A.V. Friĉ





**Kaktoj en forcejo de Botanika Ĝardeno de Naturscienca  
Fakultaro de la Universitato de Masaryk en Brno**

